

Intervjuo kun Tazio Carlevaro pri la ekspozicio

Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-797/240, 1979 januaro 18 kaj 20

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-34->

[/Radioprelego_797_SRI_240_1979_01_18_20_Intervjuo_kun_Tazio_Carlevaro_pri_la_ekspozicio_Esperanto_kaj_Interlingvistiko_en_Svislando.mp3](#)

Cl.- Parolas Claude Gacond kun D-ro Tazio Carlevaro. Dum la pasinta aŭtuno ni havis la okazon anonci, ke pretiĝas en Svislando ekspozicio pri la temo 'Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando'. Nun tiu ĉi ekspozicio estas realaĵo, ĝi estas vizitebla en la Nacia Biblioteko ĝis pasko. D-ro Tazio Carlevaro estis fakte la prezidanto de la komitato de tiu ĉi ekspozicio, kun li ni ĝin pretigis. Nun, hodiaŭ ni havas la honoron paroli kun li pri tiu ĉi realaĵo.

D-ro Tazio Carlevaro, ni eble diru kelkajn vortojn pri la ĝenerala graveco de tiu ĉi ekspozicio 'Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando'.

TC.- Vidu, estas la unua fojo ke en Svislando oni organizas ion tian. Kaj laŭ mi la graveco de tiu ekspozicio superas Svislandon, ĉar estas laŭ mi la unua fojo, ke oni organizas tian ekspozicion, kiu estu tiel kompleta kaj tiel science farita. Ni laboris, kaj vi memoras tion, dum du jaroj por esplori ĉiujn opajn faktojn kaj poste ni laboris dum unu jaro por pretigi teknike la ekspozicion. Ĝi do reprezentas unikaĵon, kies celo estas klarigi, kio estas esperanto, kio estas la historio de esperanto en Svislando kaj kiuj estas la rilatoj inter la esperanto-movado respektive la esperanta lingvo kaj la movadoj, kiuj naksiĝis apud esperanto kaj iam ie klopodis eventuale anstataŭi ĝin.

Cl.- Vi havis la okazon do labori kun la preparkomitato, vi ĉefe pretigis la temojn de la ekspozicio. Kaj nun vi venis kaj vidis ĝin. Kio estis via ĝenerala impresoj ?

TC.- Mi venis kaj vidis kaj mi estis mirigita. Efektive ni mem, kaj kun aliaj, ni pretigis multe pli da materialo kaj multe pli da temoj ol ni fakte povis prezenti. Efektive, tiu ekspozicio, almenaŭ je miaj okuloj, reprezentas specon de selekto el amaso da materialo science ellaborita, kiun ni ne povis prezenti. Kaj tamen ne pro tio venas sento de manko, sed tutsimple sento, ke taŭga ekspozicio devus esti multe pli granda kaj kion ni faris estas teknike moderna. Ekzemple, en muzeoj oni ne proponas je la vido tri aŭ kvar aŭ kvin samajn bestojn, vulpojn ekzemple, sed unu sufiĉas. Kaj tio okazis en tiu ekspozicio. Ĉiu unuopa grava paŝo de la movado, ĉiu unuopa grava momento en la historio aŭ en la nuna situacio de la esperanto-movado en Svislando estis pritraktata, sed mallonge, dense, resume kaj teknike tre interese. El la grafika vidpunkto ĝi estas granda sukceso.

Cl.- Tiu ĉi ekspozicio do rilatas al la disvolviĝo de Esperanto en Svislando. Sed eble ĝi povus havi signifon ankaŭ por eksterlando. Kio estas via vidpunkto tiurilate ?

TC.- Mi estas certa ke tia ekspozicio havus grandan sukceson ankaŭ eksterlande. Pro pluraj kaŭzoj. La unua kaŭzo estas ke la esperanto-movado en Svislando ne estas insulo, la tuta lando mem ne estas insulo kaj estas evidente ke la movado, ke la evoluo de la esperanto-movado en Svislando havas striktajn rilatojn kun la evoluo de la esperanto-movado ekster Svislando. Sufiĉas vidi ekzemple UEA, kiu naskiĝis en Svislando sed poste migris al aliaj landoj, tamen kun ĉiam sama kerno, do la fondo de UEA havis certan spiriton kiu iel restis ankoraŭ hodiaŭ. Ekzemple hodiaŭ estas Kultura Centro Esperantista (KCE), kiu disradias

iomete ĉien en la mondo, aparte nature en Eŭropo. Do, ĝi povus montri tre detale kiamaniere en iu lando esperanto-movado evoluis kaj ne limiĝas je tre ĝeneralaj aŭ tro ĝeneralaj kaj ofte tro abstraktaj observoj kaj rimarkoj, kiujn oni trovas tro ofte en kelkaj ekspozicioj pri esperanto. Aliflanke, ĝi estas ekspozicio tre interesa el la grafika vidpunkto, ĉar en tio ĝi estas ankaŭ tre sukcesa. Ĝi estis elaborita de kompetentuloj, de fakuloj, de homoj kiuj konas la grafikistan laboron. Do ĝi ne aperas, kiel bedaŭrinde mi ofte vidis, kvazaŭ fatraso do kvazaŭ amaso el tamen en si mem interesaj faktoj aŭ el interesaj dokumentoj, sed prezentitaj ne sisteme, prezentitaj malorde, prezentitaj iel sen sento pri graveco kaj reciprokeco. Tute ne! Estas la kontraŭo. Temas pri dokumentoj, kiuj prezentiĝas vere senriproĉe. Kaj verŝajne la tria afero, la tria kaŭzo, kiu igas tiun ekspozicion tre grava kaj tre interesa por eksterlandanoj, estas la fakto ke Svislando pro politikaj kaŭzoj, pro sociaj kaŭzoj estas lando organizema. Kaj la esperanto-movado praktike, kaj ĝenerale la interlingvistika movado jam de la Volapük-epoko ĝis la nuna momento sen-interrompe evoluis. Ne estis rompoj, kiel en lando kun granda milito aŭ civila milito, kaj tiel plu. Tute ne. Kaj ni povas sekvi paŝon post paŝo la evoluon de la esperanto-movado, de la aliaj movadoj kaj vidi. Kaj ofte tiuj movadoj centriĝis, dum krizaj periodoj alilande, centriĝis en Svislando kaj pere de tio kio okazis tiumomente en Svislando, ni povas kompreni, kial ili grandiĝis, tiuj movadoj, grandiĝis subite aŭ malgrandiĝis subite aŭ tutsimple malaperis. Se ni farus ĝeneralan eŭropan historion de planlingvistiko, mi kredas, ke vere sen scio detala, aparta pri la evoluo de tiu scienco kaj pri la evoluo de tiuj planlingvistikaj movadoj en Svislando oni ne povus paroli pri ĝenerala eŭropa evoluo.

Cl.- Ĝenerale ekspozicio estas fina laboro por ĉio, kio okazis en esperantujo. Por ni ĝi estas elir-laboro. Nun tiu ĉi ekspozicio evoluos kaj ni intencas ĝin montri surstrate. Tio signifas, peti al magazenoj havi loketon kaj sur tuta vojo en gravaj urboj montri sin, prezenti esperanton al la publiko. Sed tio estos laboro. Kiel, kiel prezidanto de la ekspozicia komitato, vi vidas tiun ĉi pretigadon ?

TC.- Mi vidas la aferon tiel. La paneloj, kiujn ni prezentis, estas foto-paneloj, do ili estas reprodukteblaj laŭ malsamaj grandoj. Ekzemple ni povas prezenti samtempe, ĉar ĝi estas fotaĵo, oni povas prezenti la saman ekspozicion en malsamaj lokoj. Povus esti, kaj estos sendube, rondirado de la tuta ekspozicio en gravaj kulturaj entreprenoj, ekzemple en universitatoj, en lernejoj kaj tiel plu, kun aŭ sen la dokumenta parto, ĉar evidente kelkaj raraj, tre maloftaj kaj unikaj dokumentoj ne povus tro migri, ĉar ili perdiĝas kaj ili ruiniĝas pro la lumo, kaj tiel plu. Oni povus anstataŭi ilin per fotokopioj, ktp. Poste oni povus fari pli malgrandajn panelojn, do malgrandigi la fotaĵojn kaj meti ilin en la magazenojn, eble organizi semajnojn de esperanto en malsamaj urboj, tiel ke ĉiu vendejo havu proprajn panelojn pri esperanto, pri interlingvistiko kaj tio ankaŭ helpu al la urbo kaj la komercistoj mem paroli pri si kaj ne nur pri esperanto. Kaj krome ni povus malgrandigi, plej malgrande, por tiel diri, la panelojn kaj pretigi komentariojn kaj tiamaniere publikigi eble libron ege ilustritan.

Cl.- Nun do ni pretigos komentariojn, kiuj helpas la publikon pli bone kompreni nin mem. Kaj eble helpas la esperantistojn, pli bone kompreni sin mem. Vi aŭdis intervjuon el Svislando. Claude Gacond parolis kun D-ro Tazio Carlevaro. Ĝis reaŭdo!